## KER-ekzameno Unulingva Esperanto B1

Tiu nivelo baziĝas je la specifo *Salto* de la Konsilio de Eŭropo. Ĝi pritaksas, ĉu la kandidato kapablas elturniĝi en la bazaj situacioj de la ĉiutaga vivo, komenci kaj vivteni baznivelan komunikadon en sociaj, kulturaj kaj laborejaj rilatoj.

| | **Daŭro** | **<u>Taskotipo</u>** | **Longeco** | **Poentoj** | **Minimumo** |
|---|---|---|---|---|---|
| **Parole** | 10 minutoj | **Libera interparolado** | ĉ. 4 minutoj | 40 poentoj* | 16 poentoj |
| | | **Memstara prezento de temo** (surbaze de bilda stimulo)<br><br>(la ekzamenato elektas unu el du bildoj) | ĉ. 3 minutoj | | |
| | | **Situacia ludo** (la ekzamenato prenas unu el la laŭtema stoko) | ĉ. 3 minutoj | | |
| | 30 minutoj | **Aŭda kompreno de sonregistraĵo**<br><br>- parte redaktita dialogo (multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo)<br><br>- (redaktita) teksto el aŭd-vidaj publikaĵoj (taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo, ktp.) | 1800-2200 n | 20 poentoj | 8 poentoj |
| **Parola ekzameno** | | | | **60 poentoj** | **36 poentoj**** |
| **Skribe** | 120 minutoj | **Lega kompreno**<br><br>unu pli longa aŭ du malpli longaj (redaktita(j) skribnorma(j) teksto(j)<br><br>(taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo , vera/malvera) | 2600-3000 n | 20 poentoj | 8 poentoj |
| | | **Letero (skriba sinesprimo)**<br><br>eblas elekti el du temoj;<br><br>laŭ kvar aŭ kvin skemeroj | 13-15 linioj<br><br>(ĉ. 100 vortoj) | 20 poentoj | 8 poentoj |
| | | **<u>Lingvokonaj taskoj</u>**<br><br>diverstipaj, gramatikaj kaj leksikaj taskoj (kompletigo el aŭ sen listo, transformo, ktp.) | 20 unuoj | 10 poentoj | ne estas |
| **Skriba ekzameno** | | | | **50 poentoj** | **30 poentoj**** |
| **Sume: Kompleta ekzameno** | | | | **110 poentoj** | |

* Komunika valoro 15, Vortotrezoro 15, Lingva ĝusteco 10 poentoj.

** La sumaj minimumoj de la ekzamenpartoj ne egalas al la po-taskaj minimumoj.

**Por sukcesi en la ekzameno oni devas atingi kaj la po-taskan kaj la suman minimumon.**